

UNIVERSITY OF TORONTO  
APR 15 1919

R. ...  
1.25 ~~1.25~~ #5 def

F  
B  
#

# AMERIKA ESPERANTISTO

MARCH, 1919



OFFICIAL ORGAN OF  
THE ESPERANTO ASSOCIATION  
OF NORTH AMERICA

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

MRS. I. M. HORN

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

### BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

### OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 438 15th St. 19

### SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Third Friday eve., Rm. 315 Lick Bldg., 35 Montgomery St. P-fino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Av.

### MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Society, Group No. 1. Room 13, Tooke Bldg., St. Catherine St. Meets Wednesday evening at 8.00 o'clock.

### BRIDGEPORT, CONN.

Bridgeport Esperanto Society meets every Friday at 7.30 P.M. At 284 Dover St., near Remington Arms. S-ro Gustavus McGroirty Sek., 525 Fairfield Av. Marcus L. DeVine, Pres., 284 Dover St. Visiting Esperantists call Barnum 1294-Ring 13. 19

### WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanta Klubo, 1389 Quincy St., kunvenas Ĵaŭdon vespere. 19

Kolumbia Esperanto Unuiĝo. Public meeting third Wednesday of each month except July and August at Public Library. Club meetings each Wednesday evening except third at 20 Randolph Place, N. W. All Esperantists invited.

### CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslov Sobehrad, Sec'y. 1116 W. 19th Place. La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

### BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

### WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

### PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg. Miss M. G. Ingalls, Sec'y, The Windsor, State St.

### DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, B. Lendo, Sek., 120 29th St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

### PLAINVIEW, NEBR.

Esperanto-Fako de la "Sola Skolto" (Lone Scout), 500 N. Dearborn, Chicago, Ill. (Revuo por la Junularo. Organizo grupon inter la geknaboj. Granda sukceso. Abonu tuj! Ĵare .75; Kvarmonate .25.) Fakestro, Chas. P. Lang, Plainview, Nebr.

### MANCHESTER, N. H.

Pionira Grupo. Sek., Daisy E. Flanders, 714 Beech St. 19

### HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West—All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

### BUFFALO, N. Y.

Buffalo Esperanto Society, A. E. Warren, Pres.; Miss Ray Morris, Sec.; meets Thursday evenings at 60 High St. 19

### NEW YORK CITY, N. Y.

The Greater New York Esperanto Society, including all chartered clubs in Manhattan, The Bronx, Brooklyn, Queens, Richmond, Long Island, Westchester County and the New Jersey suburbs, Miss Leonora Stoepller, Sec., 105 W. 94th St.

The New York Barĉo, or Esperanto supper, is held on the THIRD FRIDAY of every month (6.30 P. M.), Hotel Albert, Cor. 11th St. and University Place, near Broadway surface car; Subway 8th and 14th Sts.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

### CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

### PHILADELPHIA, PA.

Phila Esp. Soc. J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Bingham Hotel, 11th and Market Sts.

Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 New York Ave. 19

### PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. James McKirdy, Sec., Box 920. Fridays, 8 P. M.

### MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 632 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

---

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

---

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.

---

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)  
WEST NEWTON, MASS.

One Dollar a Year.

Du Spesmiloj Jare.

Single Copy Ten Cents.

---

VOL. 24

MARCH, 1919

NO. 1

---

### ANTAŬEN ESPERANTO.

The world is having once again a demonstration of the vital need of a common auxiliary language. Tho the proceedings of the peace conference be cut down to the simplest form possible, and only five or even four national tongues declared the official languages, it will still be manifestly impossible to prevent an unwieldiness in the parliamentary program and the absence of that free discussion which the use of one language understood by all, alone insures.

There is such an instrument ready in the International Language, **that** every thinking person who has even glanced at the subject must admit. The devotees of Esperanto are convinced of the fact from the time they learn to read their first exercise. We know that the world would be an infinitely better place to live in, in a number of ways, once Esperanto is accepted as a matter of course in all civilized countries. We know that true internationalism, idealistic, scientific, and commercial, can be promoted and given its full impetus only when the common people of the world speak, read and write, in addition to their mother tongue, a language which is universally comprehended. We Esperantists know all this; many who are not openly Esperantists know it also and freely admit it. There are others, however, who do not have or will not voice their opinion on this subject. Like the Doasyoulikes,\* they reckon not the slumbering volcano.

Advocates of the use of the International Language have nothing to gain in their unselfish labor of promoting Esperanto. Many find it thankless and discouraging work at best. Our own Association, and

\* Kingsley's "Water Babies."

678608  
Digitized by Google

the organizations in European and Asiatic countries, in suggesting and propagating Esperanto for international intercourse, can be accused of neither "profiteering" nor ulterior motives. We have a practical remedy to offer for some of the ills of this old world, chief of which is the barrier of speech, and we invite the investigation of the most hard-headed, dyed-in-the-wool, I'm-from-Missouri-ite that ever sneered or laughed at what he may be pleased to term "an idealistic movement for dreamers."

No matter what is or is not accomplished in France, a year of unequaled opportunities lies before us, demanding our loyal, unswerving and lively interest in the Esperanto cause. Cooperation within our ranks, and the general eagerness for the practical application of international instrumentalities to the interwoven world of today may yet bring us to the point where we **of this generation** shall have the privilege of observing that "All's right with the world."—I. M. H.

### AT YOUR SERVICE, MR. PRESIDENT.

Friendship must have a machinery, because, if I cannot correspond with you, if I cannot learn your mind, if I cannot co-operate with you, I cannot be your friend, and if the world is to remain a body of friends it must have the means of friendship, the means of constant friendly intercourse, the means of constant watchfulness over the common interest; not making it necessary to make a great effort to come with one another on some great occasion, but an easy and constant method of conference, so that troubles may be taken when they are little, and not allowed to grow until they are big.—(From the President's address given in Manchester, 30th December 1918.)

In response to appeals from the French Esperantist groups, the Embassy of the U. S. of A. sent the following response (in French):

Paris, Jan. 13, 1919.

Sir:—I am instructed by President Wilson to notify you of the receipt of your letter as to the adoption of a universal language. In response, the President understands that this question will be given thoro examination by the competent authorities at the time of the constituting of the Society of Nations. I beg you to accept, Mons., our hearty greetings

for the President

.....

President Wilson in his speech delivered in Boston immediately on his return to the United States, stated that his "American ear was very sadly puzzled by the difference of languages," and that "to talk through an interpreter was like witnessing the compound fracture of an idea." This was **the sole flaw** he mentioned in the proceedings at Paris.

This statement made by the President of the United States after his experience in Europe, where he was forced to come in contact with many languages and to realize the wastes and burdens caused by the want of one common language, is a powerful argument favoring Esperanto. "**May we not,**" therefore, hope that this is the entering wedge that sooner or later will call the attention of all nations to the fact that

there is an International Language and that action must be taken to the end that Esperanto be adopted, and the proper steps taken to establish it as the universal means of communication, in full accord with the ideas and hopes of Dr. Zamenhof. Further comment is unnecessary other than to state that the Esperanto World has long realized the condition as stated by President Wiison. It is fully sensed in Europe and should be in the United States.

Edward S. Payson.

### ĈU DU VORTAROJ?

Ĝis nun en niaj oficialaj rondoj regas ideo, ke la lingvo Esperanto devas konsisti el du tute apartaj vortaroj, nome la komuna kaj ia teknika. Nia Akademio havas specialajn Komisionojn por ambaŭ fakoj. La komunvortaran sektion prezidas Prof. Cart, ĉefo de la t. n. partio de "libera evolucio," kiu tezas, ke nenion en la lingvo oni devas konscie plibonigi, sed nur lasi, ke la tempo disvolvu ĉion per vojo de hazardaj ŝanĝetoj. Aliflanke Prof. de Saussure, estro de la komisiono por teknika vortaro, jam de multaj jaroj proponadis skizon post skizo de derivado, neologismoj, ŝanĝoj eĉ plej radikaliaj. Strange, la konservativoj konfesas ĉe la "teknikistoj" la rajton manipuli la lingvon preskaŭ "ad libitum," kondiĉe ke ili ne tuŝu la "literaturon" (?)

La leksikonistoj de Esperanto kiel kiaso akcentas, akcentegas kvazaŭ dividlinion inter la vortoj "oficialaj," kiujn ĉiu povas uzadi, kaj la "neologismoj," kiuj devas tute ne aperi en la "literaturo," sed sole nur en eldonadoj por fermita rondo ĉa "specialistoj." Ni havas la klasikan repertuaron de Kabe kaj ia teknika an enciklopedion de Verax, kaj ĉiu prezentas nur ducnon de la lingvo. La Plena Vortaro de Boirac presas la radikojn "komunajn" per grandliteroj, la "teknikajn" per malgrandliteroj. S-ro Grosjean-Maupin tiam timas intermiksiĝon de la "du lingvaĵoj," ke la vortojn "duon-teknikajn," kiujn neinstruito povas pridubi, li sanktomarkas per litero "t," por ke ili superrestu la uzadon de la simpla amaso.

Estas nia humila opinio, ke tia zorgega distingigo inter du vortospecoj estas ne sole kontraŭnatura, sed eĉ rekta malutilo al la sana disvolvado de nia lingvo kaj la ĝenerala sukceso de ĝia propagando. Unue, tia diferencigo ne havas lokon en la lingvoj naciaj. Ekzistas ja en ili multego da terminoj teknikaj, kiujn oni ne uzas ĝenerale, sed nur la specialistoj ĉe siaj respektivaj fakoj. Sed tiajn esprimojn la popolaj vortaroj ne sole ne proskripcias, sed la leksikonistoj ĉiam por ĉiu nova eldono de siaj verkoj klopodas kolekti la novajn vortojn enuziĝintajn sur iu kampo de la homa vivo. Kaj ĉiuj vortoj staras sur unu nivelo. Se termino montriĝis bona kaj uzinda en fako teknika, ĉiu homo havas la rajton uzi tiun terminon se en la ĝenerala literaturo li havas okazon tuŝi tiun fakon.

Cetere, kiu rajtas fiksi la interbaron inter la teknika kaj la komuna? Unuflanke ĉiu eĉ plej neinstruita homo uzas ĉiun tagon aron da esprimoj pri metiaj aŭ nemetiaj okupoj—esprimoj eble tre simplaj kaj ordinaraj, sed efektive teknikaj, ĉar ili diferencas de la esprimoj uzataj de liaj najbaroj. Stratlaboristo ne havas komplikajn taskojn, sed kiam li parolas ĉiam pri "ŝtonoj" kaj "pioco" kaj "fosilo", tiuj "komunaj" vortoj fariĝas sub lia lango ia lingvaĵo speciala aŭ teknika.

Sed de alia vidpunkto ni konstatas, ke pro la universala vulgarigado de la sciencoj terminoj, kiuj iam apartenis al la okultaj korifeoj, jam fariĝas familiara konataĵo de A. kaj B. kaj C. Ekzemple, la terminaro de la diplomatio, kiun en aŭtokrataj tempoj kaj lokoj konis, ĉar bezonis, nur la monarĥoj kaj ministroj, en landoj demokrataj estas ĉiutage uzata en la gazetoj kaj perdiskutata en la placoj. La preskaŭ tuta vortaro de la aŭtomobiloj fariĝis komuna proprajo.

Sed en Esperantujo ĝis nun ni spertas strangan fenomenon. Vortojn kiel **kupo**, **maco**, **pliko**, **kartavi**, **eca**, ĉiu povas uzi—kaj neniu bezonas uzi; dum vortoj kiel **tranĉeo**, **kamuflaĝo**, **rekvizi**, **kampanjo**, **koncilio** oni aljuĝas al la “teknika kolekto” kaj uzas heziteme en la ĝenerala literaturo. Precipe pro la superstiĉo, ke ĉiuj esprimoj, kiujn la “klasikistoj” ne havis okazon uzi, apartenas nepre al “specialistoj” sed ne al la simpla amaso,—dank’ al tiu superstiĉo la novaj adeptoj dezirante skribi aŭ paroli pri la urĝe aktualaj aferoj de la moderna vivo internacia, aŭ ne trovas en siaj vortaroj la terminojn bezonatajn aŭ trovas ilin apartomarkitajn kvazaŭ vortojn dubajn. Kion do faras la nova adepto? Li aŭ fabrikadas monstrajn, enigmajn kunmetaĵojn, aŭ transliterumas en Esperanton radikojn eble tute ne internaciajn el sia patra lingvo. Dume ekzistas, nekonata de li, en la verkoj de la t. n. “teknikistoj” bonega kaj sufiĉe plena kolekto da ĉiaj terminoj de la internaciaj aktualaĵoj! Ekzemple, granda parto de la Enciklopedia Vortareto de Verax konsistas el vortoj kaj esprimoj, kies tradukoj en la naciaj lingvoj apartenas al la komune diskutataj temoj de paco kaj milito.

En konkludo, ŝajnas al ni, ke bezonegiĝas en Esperantujo “vulgarigo” de la vortrezoroj de niaj verkoj kaj terminaroj “teknikaj.” Multege de vortoj “neoficiaj” estas tamen elprovitaj en la praktiko, uzitaj jam de multaj jaroj en la “specialaj” rondoj, kaj montriĝis plene taŭgaj kaj vere neanstataŭeblaj. Ni aludas ne simple ne-Fundamentajn **radikojn**. Sed ekzistas en la verkoj de Verax, de Saussure, Rousseau, kpt. multaj tute oportunaj **kunmetaĵoj** el radikoj Zamenhofaj, kiujn oni devus ĝenerale koni kaj uzadi. Pri tio zorgu la Lingva Komitato kaj la leksikonistoj. En alia okazo la lingvo daŭre kripligados kaj haosigados per la fuŝfabrikajĵoj de ĉiu nova adepto. Kaj la praktika mondo, imagante, ke mankas al Esperanto pretaj rimedoj por esprimado de gravaj internaciaj problemoj, preterlasos flanke nian movadon kaj irados sian vojon kiel ĉiam. Ni forlasu la teorion, ke Esperanto devas konsisti el du vortaroj; ke nia “komuna lingvo” konsistas el poezio kaj beletristikajĵoj, al kiuj sufiĉas la vortaro de Hamleto; dum la aktualajn aferojn povas pritrakti libere nur la ĉefoj en siaj fermitaj rondoj. Nur kombinante la vortarojn de Kabe kaj de Verax ni havas fundamenton de praktika lingvo internacia, unu kaj nedividebla. Ĝuste kiel ĉe niaj naciaj idiomoj la poetoj kaj la aferistoj turnas sin al unu sama repertuaro kaj riĉigas siajn verkojn, se bezone, per la esprimoj unu de la alia, tiel egale en Esperanto oni devas ne sanktamarki bonegajn elprovitajn vortojn kiel “teknikajn” sed disponigi ilin al la ĝenerala uzado. Tian laboron devus tuj entrepreni la Lingva Komitato.

## GRAVAJ ŜTATDOKUMENTOJ

THE DRAFT OF THE LEAGUE OF NATIONS  
CONSTITUTION IN ESPERANTO

**The International Language discharges its highest function when it places in form the easiest accessible to the greatest number the fundamental documents of the great World Federation.**

**Antaŭparolo.**—Por antaŭenigi internacian kunlaboradon kaj asekuri internacian pacon kaj sendangerecon akceptigante devojn sin deteni de milito, ordonante malkaŝajn, justajn kaj honestajn rilatojn inter la nacioj, firme starigante la komprenojn pri la juro internacia kiel la efektivan kondutregulon inter la Registaroj, kaj subtenante justecon kaj zorgegan plenumon al ĉiuj traktato-devoj ĉe la agado de la organizitaj popoloj unu kun aliaj, la ŝtatpotencoj ĉi-subskribintaj akceptas ĉi tiun Konstitucion por la Ligo de Nacioj.

1.—La agado de la moŝtoj-kontraktantoj laŭ la kondiĉoj de tiu interligo plenumiĝu per kunveno de delegitaro reprezentanta la moŝtojn-kontraktantojn, per kunvenoj pli oftaj de Administra Konsilantaro kaj per konstanta Internacia Sekretariaro, starigota ĉe la Ligsidejo.

2.—Kunvenoj de la delegitaro havu lokon je difinitaj tempoj kaj laŭbezone, por trakti aferojn en la kompetenco de la Ligo. Kunvenoj de la delegitaro havu lokon ĉe la Ligsidejo aŭ aliloke kiel oportune, kaj konsistu el reprezentantoj de la moŝtoj-kontraktantoj. Ĉiu el la moŝtoj-kontraktantoj havu unu voĉon, sed rajtas ne pli ol tri reprezentantojn.

3.—La Administra Konsilantaro kon istu el reprezentantoj de Usono, la Brita Imperio, Francujo, Italujo kaj Japanujo, kune kun reprezentantoj de kvar aliaj ŝtatoj membroj de la Ligo. Elektu tiujn kvar ŝtatojn la delegitaro laŭ tiaj principoj kaj maniero, kiajn ili bonaj juĝos. Gis difino de tiuj reprezentantoj de la aliaj ŝtatoj, reprezentantoj de (—loko por nomc)— estu membroj de la Administra Konsilantaro.

Kunvenoj de la konsilantaro havu lokon de tempo al tempo laŭbezone, kaj almenaŭ unu fojon ĉiujare, en kiu ajn loko antaŭ privedicota aŭ, se ne decidota, ĉe la Ligsidejo; kaj ĉia afero en la kompetenco de la Ligo aŭ efika sur la mondopaco estas traktebla en tiaj kunvenoj.

Oni invitu al kunveno de la konsilantaro ĉiun ŝtatpotencon, kies interesoj estos rekte tuŝataj per la pridiskutotaĵoj, kaj neniam decido farita en tia kunveno estu deviga por tia ŝtatpotenco, se ne invitita.

4.—La tuta proceduro ĉe kunvenoj de la delegitaro aŭ de la Administra Konsilantaro inklusive difinon de komitatoj por esplori specialajn aferojn, estu fiksata de la delegitaro aŭ la Administra Konsilantaro kaj estas privedicdebla de plimulto de la ŝtatoj reprezentataj en la kunveno.

La unuan kunvenon de la delegitaro kaj de la Administra Konsilantaro ordonu la Prezidanto de Usono.

5.—La konstanta sekretariaro de la Ligo estu starigata ĉe kiu formos la sidejon de la Ligo. La sekretariaro konsistu el sekretarioj kaj laŭbezone sub ĝenerala rego kaj kontrolo de Ĝenerala Sekretario de

la Ligo. kaj li elektigu de la Administra Konsilantaro; la sekretariaron difinu la Ĝenerala Sekretario, kondiĉe de konfirmo de la Administra Konsilantaro.

La Ĝenerala Sekretario servu siaofice en ĉiuj kunvenoj de la delegitaro aŭ de la Administra Konsilantaro.

La kostojn de la sekretariaro pagu la ŝtatoj membroj de la Ligo, laŭ la kotizsistemo de la Internacia Oficejo de la Universala Poŝta Unio.

6.—La reprezentantoj de la moŝtoj-kontraktantoj kaj la oficistoj de la Ligo, kiam okupataj per la Ligaferoj, ĝuu diplomatajn privilegiojn kaj imunecojn, kaj la konstruaĵoj okupataj de la Ligo aŭ ĝiaj oficistoj aŭ de reprezentantoj ĉeestantaj ĝiajn kunvenojn, ĝuu la bonojn de eksternaciececo.

7.—Enlaso en la Ligon de ŝtatoj ne subskribintaj la interligon kaj ne nomitaj en la aldona protokolo kiel ŝtatoj invitotaj aliĝi al la interkonsento postulas konsenton de ne malpli ol du trionoj de la ŝtatoj reprezentataj en la delegitaro, kaj limiĝu nur al memregataj landoj, inkluzive subregnoj kaj kolonioj.

Neniu ŝtato enlasigu en la Ligon, krom povanta doni efikajn garanti-ojn pri sia sincera intenco observadi siajn internaciajn devojn, kaj krom konformiĝinta al tiaj principoj, kiajn diktus la Ligo rilate ĝiajn mar-kaj tearmeajn fortojn kaj armilojn.

8.—La moŝtoj-kontraktantoj konfesas la principon, ke daŭrigado de paco postulos malpliigon de la naciaj armiloj ĝis nur sufiĉaj por nacia sendanĝereco, kaj komunagan observigadon de la internaciaj devoj, kun speciala rilato al la geografia situacio kaj cirkonstancoj de ĉiu ŝtato; kaj la Administra Konsilantaro formulu planojn por efektivigi tian malpliigon.

La Administra Konsilantaro ankaŭ determinu por konsiderado kaj agado de la diversaj Registaroj, kia milita ekipaĵo kaj armateco estas justa kaj racia proporcie al la grado de fortoj metita en la programon de senarmigado; kaj tiuj limoj, unu fojon akceptitaj, ne estu superataj sen permeso de la Administra Konsilantaro.

La moŝtoj-kontraktantoj konsentas, ke la privata fabrikado de militiloj kaj militaĵoj estas akre kritikebla, kaj direktas, ke la Administra Konsilantaro konsilu, kiamaniere malebligi le malbonojn sekvajn je tia fabrikado, kun deca zorgo al la nepraj bezonoj de tiuj landoj, kiuj mem ne povas fabriki al si la militilojn kaj militaĵojn necesajn por sia sekureco.

La moŝtoj-kontraktantoj neniel penas kaŝi reciproke la staton de tiaj siaj industrioj, kiuj estas alfareblaj al celoj militaj, nek la gradon de sia armateco, kaj konsentas, ke estos plena kaj libera interŝanĝado de informoj pri iliaj ter—kaj mar-armeaj programoj.

9.—Konstanta komisiono estu formata, por konsiladi al la Ligo pri plenumado de la aranĝoj de la Artikolo 8 kaj pri la ter- kaj mar-armeaj aferoj ĝenerale.

10.—La moŝtoj-kontraktantoj kontraktas respektadi kaj konservadi kontraŭ eventualaj uzurpoj el ekstere la teritorian tutecon kaj jaman politikan memstarecon de ĉiuj ŝtatoj membroj de la Ligo. Okaze de tia uzurpo aŭ okaze minaco aŭ danĝero de tia uzurpo, la Administra Konsilantaro konsilu pri la rimedoj, per kiuj la devo estos plenumata.

daŭrigota



## MONTREAL NEWS.

Karaj Gesamideanoj :—

Somewhat less than one year ago a few Esperanto enthusiasts in Montreal grouped themselves together and founded what is now known as the Montreal Esperanto Society—Group No. 1. The Star of Hope was high in their heavens, and their dreams for the future of Esperanto in Canada were filled with both practical and idealistic visions of what might be done for the amelioration of humanity as a whole and the enjoyment of all.

Many of those visions have since become episodes in real life.

The Membership Roll has reached fifty-four (54), and there are many interested, who will join us as soon as they find Esperanto worthy of the praise it receives. This, they are bound to do, for Esperanto is unique, and the study of it no mere fanatic's whim. It is simplicity itself, as we 'komenculoj' know. We feel certain that a little time spent each day will perfect our speech in a short while.

We are happy to know the 12th E. A. N. A. Congress will be held in Montreal this summer. Another dream to be fulfilled.

Each Wednesday evening we Esperantists meet in our own room, where the Esperantists' Flag is going to fly; where the picture of Louis Lazare Zamenhof, the idealist, will hang, as an inspiration and encouragement to work for the propagation of this wonderful international language; where our library will be; where all may come, and be welcome; last, where the children of our city may learn the beauty and rhythm, the harmony and joy, which are the principal qualities made manifest in the study and use of Esperanto.

Today, February 23, witnessed the first children's Esperanto Class. Ten youngsters were present and it was a very deeply felt pleasure to see them, and to know that they, our rising generation, will hold for us, through the medium of international understanding, the Peace that the Flower of Manhood shed its life blood to obtain.

Mr. C. F. Bardorf is a wonderful president. We owe a great deal to him. He is ever striving to bring us to success, and we appreciate all he is and does.

We have many friends and they, although unable to attend our meetings regularly, inspire us, and give us strength to keep pushing ahead.

In closing, let me hope that every desire of the Esperantists be realized, and may the E. A. N. A. flourish and be made known to more and more persons who will concern themselves for the furtherance of Esperanto and its Cause.

Montreal Esperanto Society—Group No. 1. . . .

Secretary, E. Strachan.

\* \* \* \* \*

"La pensmaniero de la homoj de animoj simplaj tie ĉi kaj ĉie tra la monda, —homoj kiuj ĝuas nenian privilegion, kaj havas normilojn de rajteco kaj malrajteco tre simplajn kaj ne mondumecitajn—tio estas speco de aero kiun ĉiuj regoj devos de nun spiri, se ili volas vivadi."

Woodrow Wilson

trad. Wm. R. Daingerfield  
gen. del. Oakland, Cal.

## PHILADELPHIA

Antaŭ nemultaj monatoj la loka Societo decidis translokigi por trovi pli komfortan, pli taŭgan sidejon. Do, oni aranĝis kun la Bingham Hotel, 11a kaj Market Stratoj por ke la estontaj Barĉoj kaj kunvenoj tie okazu la kvaran vendredon ĉiumonate. Samideanojn kaj ne-Esperantistajn vizitantojn la urbon oni petas notu la lokon kaj daton kaj nepre ĉeestu la festojn. La Barĉo aŭ Esperantista vespermanĝo okazas je la 6.30 a, kaj je la 8 a en la salono en la dua etaĝo oni pasigas la tempon per muziko, ludoj, deklamoj, rakontoj aŭ nur babilado.

Vizitantoj ĉe la "Betsy Ross House," kie dum la Revolucio oni elfaris la unuan Usonan standardon nun vidas, en la vera ĉambro kie okazis ĉi-tio, du malgrandajn standardojn sur la muro kaj sur la stangetoj krucigitaj oni legas sur ŝildo:

Let America Lead  
the way to  
World Brotherhood thru  
International Justice and  
ESPERANTO  
The International Language

Antaŭe, Usono,  
Konduku al Vojo  
de Tutmondfrateco  
per Interjusteco  
kaj per Esperanto,  
Lingv' Internacia

This Esperanto Flag was  
presented by the  
Universala Esperanto Asocio  
on the occasion of a visit to  
The Birthplace of "Old Glory"  
by the Boy and Girl Scouts  
of Philadelphia  
Feb. 22, 1918.

Tiu ĉi standardo Esperanta  
estas donacita de la U. E. A.  
okaze de vizito ĉe la  
Naskejo de "Old Glory"  
de la Geknabskoltoj de Fila.  
Feb. 22, 1918.

## BEST TRANSLATION FROM JANUARY NUMBER

La senfadena telefono por uzado en aeroplanoj jam tiagrade perfektigis, ke ĝi estas praktika kaj estas unu el la mirindaĵoj de la milito. La senfadena telefono ne estas nova elpensajo. Antaŭ tri jaroj Militŝiparestro Daniels, en el oficejo en Vaŝingtono, parolis al la Usona militŝipo New Hampshire kaj ricevis elbuŝan respondon. Sed la viro, kiu, pro bruo de la motoroj, trovis neeble aŭdigi eĉ unu vorton al la piloto apud si en aeroplano ne povis kredi al si, ke la tempo venos, kiam flugisto en alia maŝino faranta egalan bruadon povos kunparoladi kun li je distanco kalkulata po mejloj. Tamen tio estas la tasko, kiun radiaj spertuloj ekpenis plenumi kaj kiun ili nun estas elfarintaj.

Okjara laborado de armeaj kaj civilaj spertuloj kulminaciis en elmontro ĉe Dayton, Ohio, en decembro, 1917, antaŭ la aerveturarta konsilantaro kaj la kuna arma militŝipara teknika konsilantaro, kiam la observistoj en du aeroplanoj supertere flugantaj interŝanĝis parolojn ĉiu kun la alia kaj kun la surtera stacio tiel facile kiel en okazo, ke ili uzus ordinaran telefonlinion, kaj la aeroplanoj flugis kun ne plimulte da bruo ol tiom, kiom birdo faras.

—Tradukis D. M. Lyons, 1821 Delaware Strato, Berkeley, Cal.

## FOR THE BEGINNER

Our readers are invited to send us any difficulties encountered in their study of the international language, inquiries being answered promptly and completely in this department of the magazine.

**Answers to the Demandaro in November Number, With Correction of Mistakes.**

Here is the complete list of root words for RELATIVES (parencoj):

avo — patro — filo — nepo  
 onklo — nevo  
 kuzo  
 edzo

From these all other words for RELATIVES (parencoj) are derived by means of affixes (as we shall see later).

2. La ordinaraĵoj estas en mia urbo estas hundoj, katoj, ĉevaloj, muloj, bovinoj. Jes, birdo estas besto. La homo ankaŭ estas besto.

3. En potoj mi kulturas la jenajn florojn: geranioj, bignonioj, tradeskancio (wandering Jew), ciklameno. Mia plej amata floro estas la rozo.

4. An answer received stated: "La planedoj estas migraj steloj, kaj la steloj estas firmaj steloj." Ne, steloj migraj pli ĝuste estas la **kometoj**, **aerolitoj** kaj similaj. La planedoj estas astroj **rondirantaj**. As for "**firmaj steloj**" any star not composed of water or gas would be a **firma** stelo. A "fixed star" would be **fiksa stelo** (or better **fiksa ASTRO**).

Here is a table of the HEAVENLY BODIES (astroj).

suno — steloj  
 planedoj — (tero) — asteroidoj  
 luno  
 kometoj — aerolitoj

ASTRO covers any and all of the above; STELO, strictly speaking, applies only to the **fixed stars**, tho in a loose way it may be used for anything but the moon.

5. The word FARTO has no one-word equivalent in English: it means "state of health" (whether good or bad), including either **saneco** or **malsaneco**. There is a tendency among English speakers to use **sano** in its place: this is incorrect, as **sano** refers to **good** health only. (By an inadvertence "influenza" was rendered by us **influenzo**: the correct word is **influenCo**.)

Of course "I am well" would not be "mi estas bona" but "**sana**."

6. Most words for those engaged in a trade or profession are formed from the word for the trade or profession by addition of the "professional suffix"—**ist**. So if you merely know the word for your occupation you can tell what you are. Ekzemple, mi estas **muzik-isto**, unu onklo estas **komerc-isto**, alia estas **kurac-isto**, unu kuzo estas **instru-isto**, ktp. (etc.). In a few cases it seems more natural to have a simple root (without **-ist**) for the worker, as **pastro**, **tajloro**, **astronomo** (handier than **astronomiisto**, which also, however, occurs).

7. The main root words for COLOR (**koloroj**) are:

**blanka**, **nigra**, **griza**, **blua**, **verda**, **ruĝa**, **bruna**, **flava**, **purpura**.

8. One answer sent in said: "Oni uzas libron **por ke lerni aŭ legi.**" The **ke** is superfluous. Of course one might also have "por ke oni lernu aŭ legu," in which **ke** would be correct as introducing a subordinate **clause**. **Ke** may only precede a **clause**, never an **infinitive**.

9. Remember that transitive verbs (those which connect the **SUBJECT** with someone or something **ELSE**) always have their objects (the "else" word in the accusative case, whose ending is **-n**).

But **prepositions**, contrary to English, are **not** followed by the accusative, that is the word after them remains without **-n**.

(The fact is the preposition simply replaces the case-ending.)

(If in good Esperanto you find the acc. case after a preposition, it is never because of the preposition, but for some other reason—generally acc. of "end of motion.")

10. English has two means of forming the possessive case: 's or "of"; Esperanto has but one way, the "of" way.

11. Jes, infano estas homo, sed nematura homo.

12. The nearest **Esp.** to the verb "to walk" is **paŝi**, but much more commonly simple **iri** (to go) is used in that sense, while **marŝi** in the best usage is restricted to the military pace.

13. Note the expressions: **doni al iu manĝi** (to give one something to eat), **doni al iu trinki** (to give one a drink). Esperanto like any other language has its characteristic phrases.

14. The most common greeting in **Esp.**, corresponding to our "How do you do?" is **Bonan tagon**, which is good for any hour of the day (or night). **Bonan matenon** is used much less frequently than in **Eng.**, **Bonan vesperon** more frequently than the former, while **Bonan nokton** is used as its **Eng.** equivalent. "**Kiel vi fartas?**" **betokens** more real solicitude in **Esp.** than its literal counterpart in **Eng.**

15. Per Esperanto mi deziras komuniki al alilingvuloj la bonajn pensojn de mia patrolando kaj samtempe ricevi de alilingvuloj iliajn **bonajn pensojn**. **La vivo estas tro mallonga, ke mi ellernu iliajn mil lingvojn kaj ke ili ellernu la mian kaj naŭcent naŭdek naŭ aliajn.**

16. Esperanto estas almenaŭ 25 fojojn pli simpla, ol la plej simpla lingvo natura. Rilate al esprimovo ĝi estas, potence, senfine pli riĉa, ol la greka, la plej delikata el ĉiu naturaj idiomoj.

17. Se du domoj estas egale grandaj, do unu domo estas **tiel** granda, **kiel** la dua. The **kompariloj** of equality, then, are **tiel . . . kiel**.

18. Texas estas la plej granda, Rhode Island la plej malgranda (or malplej granda) Usona ŝtato.

19. **Freŝa** and **vigla** both mean "fresh," but the former refers to **physical** freshness, the latter to **mental**.

**Hela**=bright, **luma**=light (luminous), **brila**=brilliant: **get the distinctions** (very slight) between the **Eng.** equivalents and you have the distinctions between these **Esp.** synonyms.

What is the difference between **juna** and **nova**?

What is the difference between **forta** and **fortika**?

**Laborema** and **diligenta** mean practically the same thing, as do their mal- derivatives.

**Ŝaga** is used more widely than the **Eng.** "wise," which is its "dictionary" equivalent—it corresponds more nearly to our word "sen-

sible." **Prudenta**, strictly speaking, = "rational" (opposite of **freneza**, "insane") but also sometimes = "intelligent." **Sagaca** = **shrewd**, canny.

Distinguish **agrabla** and **afabla**, both meaning "pleasant," but the former referring to things, the latter to persons.

### FOR BEGINNERS AND ADVANCED STUDENTS

Translate into Esperanto what the Japanese notice (see page 3 of February issue) intended to say. The best translation, not of the words but of the ideas, received before May 5, will appear in this magazine.

#### PSALMO PRI LA VIVO

Henry Wadsworth Longfellow

|  |  |
|--|--|
| Ne kredigu, cinikulo,<br>Ke la viv' ne sencas ajn,<br>Fi al vi, sencerba bulo!<br>Ĉio estas ne laŭ ŝajn'.        | Sur la monda batalmaro,<br>En la vasta vivmilit',<br>Ne similu je brutaro;<br>Estu viro per spirit'!       |
| Homa cel' efektiviĝos,<br>Ne la tombo ĝia lim';<br>"Polvo, polv' vi refariĝos,"<br>Ne minacas al anim'.          | Ne pri la morgaŭa suno,<br>Nek pasinta revu ni;<br>Agu,—agu tuj en nuno,<br>Kun kuraĝ' kaj dank' al Di!    |
| Nek plezuro, nek malĝojo,<br>Estas nia vivordon',<br>Sed per ĉiam supren vojo<br>Peni al spirita kron'.          | Famaj vivoj nin instruas,<br>Ke ni flori povas mem,<br>Por ke, kiam ni forfluas,<br>Restu poste bona sem'; |
| Nu, pli vigle! Tempo mortas;<br>Eĉ plej brava nia kor'<br>Per funebraj batoj portas<br>Nin en tombon baldaŭ for. | Semo, kiu fruktiĝinte,<br>Eble al estonta frat'<br>Servos, kaj lin, manĝiginte,<br>Savos el animmalsat'.   |
| Ni do viglu, ni do agu,<br>Kio ajn la nia sort';<br>Nian ŝviton ni elpagu<br>Esperplene ĝis la mort'.            |  |

Tradukis Herbert M. Scott

Knabeto, kiu sidis en homplena tramveturilo apud fierega virino enflaradis laŭ tre malagrabla maniero. Fine, la virino ne povante plu toleri ĝin, diris al la knabeto:

Ĉu vi havas naztukon?

—Jes, respondis la knabeto, — sed mi ne pruntedonas ĝin al nekonatoj.

—Esperanto Monthly.

## KELKAJ HINDAJ MOROJ

Mia intenco estas skribi ion pri la hindaj moroj de la “Caco” (Argentina) precipe de la “Ĉirigŭanoj” kaj “Matakoj” ĉar mi estis loĝanta inter tiuj gentoj ĉirkaŭ dek ses monatoj.

La Ĉirigŭanoj kaj Matakoj estas malsamaj gentoj kvankam ili estas de la sama raso; ĉiu gento havas sian apartan ĉefestron (nomata kaciko tamen la du gentoj estas tre amikaj, estante ĉiuj siaj moroj samaj. Por kalkuli la jarojn, ili kalkulas per “lunoj”; tio estas, de ĉiu novluno komencas unu jaro laŭ ili. Ĉiuj la gentoj adoras la “Sunon” kiel sia “Dio” kaj en la unua tago de sia sunjaro (la de Septembro) okazas la festo al la “Suno” kiel religia festo; estas kutimo inter ili oferi la plej belan junulinon el ĉiu gento kiel amatinon al la “Suno”; ŝi estas vivanta bruligata antaŭ ĉiuj en la momento kiam levigas la suno,—anonco de la tago. La oferanto aŭ la persono kiu devas ekbruligi la fajron, estas ŝia propra patro aŭ patrino. La tagon antaŭ la ofero, la oferotulino sin adiaŭas ĉe ĉiuj la personoj de la gento, la laste adiaŭataj estas siaj geamikoj. La unuan fojon kiam mi vidis tian feston mi estis la lastadiaŭata de la oferotulino. Kun larmoj en la okuloj en hinda lingvo ŝi diris al mi—Huinka (Kristano) ĉar vi estas la unua Huinka kiu loĝis inter nia gento, mi de la “Suno” preĝos por ke vi vivu tre feliĉa sur la tero—poste, ĉirkaŭprenis ŝi kaj kisis min, adiaŭante samtempe.

La najbara gento “Folias” estas hindoj tre sovaĝaj kaj kanibalaj, ili ĉiam estas batalantaj kontraŭ la aliaj gentoj, mangante la mortintojn uzante kiel armilojn la pafarkojn kaj sagojn.

Mi devus esti verkisto anstataŭ verkanto, per ke mi povu esprimi bone ĉion kion mi vidis inter la hindoj tamen mi kredas ke la legantaro devas koni la terurajn morojn de tiuj hindaj gentoj, sed ne ĉiujn ĉar ili posedas aliajn. Mi jam skribos pri aliaj moroj de tiuj gentoj, kaj ankaŭ de la hindoj de tiu ĉi lando (Bolivio) ĉar ili ankaŭ estas tre kuriozaj.

Higinio Garcia.

Angla vojaĝanto veturadis en Irlando, kaj la gvidisto al li estis montrinta la Montfendon de l' Diablo, la Monteton de l' Diablo kaj la salton de l' Diablo.

“Pat,” diris li (ĉiuj anglaj vojaĝantoj nomas irlandajn kamparanojn “Pat,” same kiel ili nomas knabetojn “Tommy”) “ŝajnas ke la diablo havas multajn posedaĵojn en tiu ĉi parto de la lando.”

“Jes,” respondis la sprita irlandano, “sed li similas niajn aliajn bienposedantojn—li loĝas en Anglujo.”

—Esperanto Monthly.

\* \* \* \* \*

**Spirita Filo**

“Kiam mi estis junulo mi laboris dekdu horojn ĉiutage,” diris patro.

“Mi admiras vian junecan energion,” respondis la filo, “sed mi multe pli admiras la maturaĝan saĝecon, kiu konsilis al vi ke vi ĉesu.”

El “Washington Star.”

Trad. Efodo.

## OUR EXCHANGES

We have received at this office a number of Esperanto and other periodicals, not hitherto acknowledged, in which we note the following valuable articles (those in Esperanto in **boldface** type):

- La Espero—Dec.—Page's League of Nations and Esperanto; Esperanto and the Hapsburg state; **Mr. Cinder and his good helpers.**
- La Espero—Jan.—Scout-Esperantists; Swiss League of Nations Committee; **obituaries of Holger Landgren and Bruno Riefing.**
- Esperantista Voĉo—Jan.—**Emile Boirac; the new year; Chronicle.**
- Holanda Pioniro—Jan.-Feb.—proposed Zamenhof memorial; **unlucky voyage of the Hertog Hendrick in 1918;** proposed union of Dutch Esperanto gazettes.
- Brazila Esperantisto—July-Sept.—Esperanto celebration and inauguration of Zamenhof Street, July 21; Course in Normal school, Aug. 9; **flowers;** prepositions and proverbs; chronicle.
- Brazila Esperantisto—Oct.-Dec.—**Text of laws putting Esperanto into normal and secondary schools in Sergipe and Rio de Janeiro; the little portrait; the voyager;** Kent's address on a Common Commercial Language; the British committee of Parliament on international language.
- Teknika Revuo—Jan.-Feb.—Specialization in medicine; illustrations and literary magazines (hist.); the "ksilotherm"; international associations; technical vocabulary. (Together with "**The Ascent of Mt. Blanc**" as a pamphlet.)
- World Salesman—March—Rugs of North China; hints to exporters; Philippine sugar; business and financial conditions in the U. S.; economic outlook; Siberia's future; Anam mining; the new Italy; Chinese department stores with hotel annex; how to pack for export; **Japan's industrial progress;** Russian, Spanish, Japanese and Esperanto sections.
- Le Monde Esperantiste—Jan.-Feb.—The Society of Nations; Comparison of English and French idioms with Esp.; **Tolstoy's War Tales; Tretiakof's Vengeance.**
- British Esperantist—Feb.—**Call to Esperantists by U. E. A.;** chronicle; answers of parliamentary candidates to questions on Esperanto; the Ligilo.
- Esperanto, B.B.—Jan.—Argentine Free-thinkers' Congress votes to adopt Esp.; **Esp. and Patriotism;** literary contest; **Dusk in the Zoological Park;** River-Plata E. Klubo founded at Montevideo.
- Argentina Esperantisto — Nov.-Dec. — **Report of Centra Komitato A.E.A.;** the Esperanto Home. Along with the magazine came an excellent 48-page propaganda booklet in Spanish containing a summary of all aspects of the Esperanto movement; an article on Esperanto in Brazil; a course of 18 lessons, and a vocabulary. A fine value at the publishing price of 20 cts.
- Esperanto Monthly — Feb. — Fifth to Eighth Week's lessons in Commercial Esperanto; **Wilson on Friendship.**
- Svisa Espero — Jan.-Feb. — **The Santa Scala; chronicle; plans.**

## OFFICE NOTES.

Many of our readers see this magazine in public libraries: we are glad of the publicity that the magazine thereby gets. The magazine needs more subscriptions to become self-supporting, better and bigger. If you are a reader and not a subscriber, why not, as part of your duty as an Esperantist, send in a subscription for some library which does not get the magazine. Every public library in English-speaking North America ought to be on our list.

\* \* \* \* \*

A letter received at this office recently strikes us as an effective yet unobtrusive mode of propaganda. Rubrics printed in green appear at the upper and lower margins of the sheet; at the top:

“ESPERANTO is as necessary as the railway train, the steamship, the postal system, the cable, the telegraph and the telephone; that is to say—a practical and efficient means of intercommunication, applicable to every department of modern life. ESPERANTO claims the serious attention of rulers, statesmen, and educationists; of leaders of religion, social enterprise, science, commerce and industry; of all whose range of vision extends beyond the limits of language or country, and who feel, or desire to feel, that they are citizens of the world.”

Bernard Long.

at the bottom:

“We have not the least wish to interfere with the inner life of the various nations; we only want to establish a bond between them. We desire to lay a neutral foundation, on which the diverse races of mankind may peacefully fraternize, without imposing on each other their racial differences.”

Zamenhof.

\* \* \* \* \*

If any samideanoj are within reach of Liverpool from June 6 to 10 they should make it a point to attend the B. E. A. congress. Australia announces its third congress to occur in Sydney in Sept., 1919.

\* \* \* \* \*

Have you shown your magazine to any non-subscriber, Esperantist or non-Esperantist, or is it thrown away after reading? A few sent with a “key” to our soldiers still abroad may lead to valuable friendships and much enjoyment.

\* \* \* \* \*

Please rush all proposals for changes in the E. A. of N. A. Constitution to Henry W. Fisher, care of S. M. Cable Co., Perth Amboy, N. J.

\* \* \* \* \*

The Perkins medal, one of the highest awards given for work in the field of applied chemistry, has been awarded to Dr. Frederick G. Cottrell, chief of the bureau of mines, according to word received from Washington.

A war-time invention of Dr. Cottrell saved the government millions of dollars' worth of smelter and mine products, which would have wasted. The invention was used by the Hercules Powder Company in the manufacture of munitions. Another of his inventions was a non-inflammable gas for filling balloons. Large quantities of this were used by the American army.

We Esperantists are expecting great things from Dr. Cottrell.



From the Omsk Esperanto Society comes a postcard in Esperanto 1. for addresses of correspondents; 2. for addresses of Esperanto publishing firms; 3. what Esperanto books and journals are appearing and have appeared since 1914; 4. what has occurred since 1914. Omsk, Siberio, Varlmoska 69 Omska Societo Esperanto.

\* \* \* \* \*

We expect to print the rest of the League of Nations agreement in the May number of A. E.

### KELKAJ RIDETOJ

#### Komplezema Viro

Inter miaj konatoj estas du viroj nomataj S-ro B. kaj S-ro C. kiuj havis teruran malamon unu al la alia. Unu tagon kiam estis okazinta granda pluvo, farinte multe da koto, miaj du konatoj reciproke renkontis en tre mallargâ voĵeto tra malbona loko.

Ili renkontis, haltis, kaj kun sulkiĝantaj fruntoj, faris la sekvan-tan interparoladon.

S-ro B.—“Kial vi ne flankeniras?”

S-ro C.—“Mi neniam flankeniras por azenviro.”

S-ro B.—“Pardonu al mi, mi ĉiam tion faras.”

Kaj S-ro B. eksaltis en la koton, dum S-ro C. reiris laŭ sia vojo.

—Geo. Lackey, Putney, Vermont.

\* \* \* \* \*

Georgo—Se vi donos al mi hartufon el la kapo de via fratino, mi donos al vi unu pencon.

Tomaso—Donu ses pencojn al mi, kaj mi donos al vi ŝian tutan perukon.

—Esperanto Monthly.

\* \* \* \* \*

“Lanternisto, kial vi ekbruligas lanternojn?”

“Estas ja mallume,—ĉirkaŭe marŝas ŝtelistoj.”

“Nu, tial mi diras, ne lumigu, ili ekvidos la lanternojn kaj ŝtelos ilin.”—D. E. P.

\* \* \* \* \*

Instruisto (al knabeto)—Kio estas via nomo?

Knabo—Georgo Smith.

Instruisto—Vi devus diri, “Sinjoro,” kiam vi parolas al la instruisto.

Knabo—Sinjoro Georgo Smith.

—Esperanto Monthly.

\* \* \* \* \*

—Atentu nun, Haroldo, diris patro al sia malgranda filo, kiu estis petolema.—Se vi ne diros viajn preĝojn, vi ne iros al ĉielo.

—Sed, patro, mi ne volas iri al ĉielo, ploregante diris la knabo,—mi volas iri kun vi kaj patrino.

—Esperanto Monthly.

\* \* \* \* \*

Georgo (al Tomaso, kiu fiŝkaptas)—Kiom vi kaptis?

Tomaso—Ho, mi ne povus kalkuli ilin.

Georgo (rigardanta en la fiŝujon)—Oho! Vi tute ne kaptis iom.

Tomaso—Jen, tial mi ne povas kalkuli ilin.

—Esperanto Monthly.

## DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje: 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

Se prezentas por vi intereson la lando de estonto, se vi deziras ricevi ajnan informon pri ĝi, se vi deziras akiri korespondantojn en diversaj urboj de Siberto, se vi volas helpi al la movado Esperantista en tiu regiono, skribu al Siberia Esperanto Oficejo, Tomsk, Siberio.

S-ro Ch. Antrique, 4 rue de Biennes prolongee. Aire sur la Lys. Pas de Calais, Francujo.

S-ro Gordon Lindsay, 57 Murray St., Prahran, Victoria, Australia. Deziras korespondi kun knaboskoltoj.

F-ino Cora Fowler, 208 S. Locust St., Champaign, Illinois, Usono 3

Margaret Smart, 1105 W. University Ave., Urbana, Illinois, Usono. 3

F-ino Alice Desprez, Aze, Saone-et-Loire, Francujo—kun Amerikoj, kaj precipe kun Usonaj soldatoj.

Oscar Kalliokoski, R. A. — Box 71, Parlier, Cal., Usono, deziras korespondi kun junaj gesamideanoj en Kubo kaj Suda Ameriko. 4

S-ro Harold Straw, Guilford, Maine, Usono.

Armand B. Coigne, 193rd Street and Creston Avenue, New York, Usono. Deziras koni personojn interesatajn en int. asocio por psika enketado kiel helpontoj kaj avizantoj. Ne korespondos pri psikismo nek ia temo escepte la asocion, kaj NE RESPONDOS al PK kaj PM kolektantoj.

F-ino Elva D. Kellogg, Arnolds Park, Iowa. 3

## The Surprises at Sylvia Farm

A Propaganda Play in Five Acts

By HENRY W. FISHER

Ex-President of the E. A. N. A.

THIS IS A VERY CLEVER LITTLE PLAY, AND A WELCOME ADDITION TO OUR LIST OF PUBLICATIONS.

MR. FISHER has paid the whole expense of publication and offers the entire receipts from its sale for the use of the Central Office in propaganda work. Will you meet him half way, and enable us to dispose of the entire edition of 1000 copies at once?

25 cents per copy, postpaid

The Esperanto Office, West Newton, Mass.

## “THE WORLD SALESMAN”

(Grown out of the Japan Salesman)

*A Monthly Commercial Review, published in Yokohama, Japan, by an American concern*

THE WORLD SALESMAN is the first commercial journal to have drawn attention to the value of Esperanto as the common commercial language. It has regular articles on Esperanto, and publishes the names of firms using the international language.

**It will keep you posted on World Trade. If you want to do business with the Far East or any other section, IT WILL PAY YOU TO ADVERTISE IN THE WORLD SALESMAN.**

*Advertising Rates on application. Subscription, \$5.00 for two years.*

HEAD OFFICE: 51, YAMASHITACHO, YOKOHAMA, JAPAN.  
NEW YORK OFFICE: SINGER BUILDING.